

*Pajam-e Sabzandishan* (Mesaĝo de Verdpensuloj)  
Kultura sezon-revuo en E-o kaj la persa. En  
E-mondo aperas sub la nomo Irana E-isto:

## IRANA ESPERANTISTO

IRANA ESPERANTISTO estas sendependa  
kultura revuo kiu eldoniĝas en Irano.

### Respondeca direktorino :

*Fariba N. Maĝd*

### Ĉefredaktoro :

*M. Reza Torabi*



### Kovrilo:

*Panoramo de Bam-Citadelo*

*De: Mahmud Mirbozorgi kaj  
Reza Hasanlu*

### Persa kovrilo:

De (f-ino) Jahŝi Habibpur  
(Yakhshi Habibpur)

### Eldonaj aferoj :

*Reza Haĝihasanlu*

### Eksterlanda abono:

*Hamzeh Ŝafii*

### Adresoj:

P.O.Kesto 17765-184,  
Tehran, Iran  
Telefono : (0098 21) 7437138  
Fakso : (009821) 7463812  
TTT-ejo : www.sabzandishan.com  
Retpoŝto: info@sabzandishan.com

Bonvenas eseoj, artikoloj, raportoj kaj  
kontribuaĵoj kondiĉe ke ili ne estu pub-  
likigitaj antaŭe. Bonvenas kultur-temaj  
kontribuaĵoj ĉu en Esperanto ĉu en la  
persa.

### Enhavo:

<i>Nova proverbaro</i> .....	paĝo 2
<i>Sinprezento de Ŝirin Ahmadnia</i> .....	3
<i>Poemo de Ŝirin Ahmadnia</i> .....	4
<i>Iranaj historiaĵoj: Bam-Citadelo</i> .....	5
<i>Iranaj artistoj - Sohrab Sepehri-</i> .....	8-11
<i>La nigrigita mevo</i> .....	12
<i>Vojaĝ-raporto de Japana karavano</i> .....	13

### Persa parto :

<b>Redaktora noto</b> .....	paĝo 39
<b>Raporto</b> .....	38
Raporo pri la 10-a Irana gazetar- festivalo en kiu nia revuo unafoje partoprenis kaj sufiĉe bone brilis.	
<b>Kronologio de E-movado en Irano</b> .....	25
Okaze la dejkariĝo de IREJO oni skizas evtajn dum la dekjaraj ekde ĝia apero.	
<b>Memorfotoj Okaze IREJO dejariĝo</b> .....	23
<b>10-jara nova E-movado en Irano</b> .....	34
Notoj varie okaze la dejariĝo de IREJO kaj nova E-movado en Irano.	
<b>Kio ni estas kaj kion ni celas?</b> .....	31
Traduko de la kvara parto de samtitola libreto de UEA. Ĝi prezentas la celojn de E-movado tra la mondo. Tradukis Reza Torabi.	
<b>Mondo de interreto</b> .....	28
Prezento de diversaj eblecoj kaj retejoj per kiuj oni povas ĝui interreton kaj facilan komunikadon.	
<b>Angla: ĉu nacia aŭ internacia?</b> .....	27
Ahmad Reza Mamduhi prezentas tradukaĵojn el Esperanto-revuo laŭ la temo.	
<b>Historio de E-o en Irano</b> .....	24
Ali Reza Doŭlatŝahi (Dowlatsahi) daŭre plumas kaj prilumas la pasintecon de E-movado en Irano.	
<b>Verda medio</b> .....	22
Najere(Nayere) Ebrahimpur artikolas pri medioprotektado kaj kiel oni povas protekti marbordojn.	
<b>Pasporta Servo</b> .....	21
Informoj pri Pasorta Servo de TEJO.	
<b>Esperanto, literaturo kaj traduko</b> .....	20
Artikolo de Golam Reza Azarhuŝang.	
<b>Vojaĝraporto</b> .....	15
Traduko de la vojaĝraporto de TAKAOKA Michiko pri Vojaĝo de Japanaj Esperantistoj al Irano.	

**Estimataj legantoj,  
Saluton!**

1. *La nomo de la revuo estas ŝanĝita al IRANA ESPERANTISTO. Ekde la komenco ni jam sciis ke en Esperantujo oni ne povos facile prononci la originalan nomon sed al ni, ne estis facile diciblele elekti esperantan nomon ĉar laŭ la reguloj tia proceduro povus daŭri longan tempon, do la decido estis tio ke ni tenu la jam registritan kaj laŭ-permesilan nomon "Sabzandiŝan" kiel oficiala nomo kaj en Esperantujo ni estu rekonata kiel "IRANA ESPERANTISTO". Dankon al Mahmud Mirbozorgi kiu desegins la simbolon de la nova nomo.*

2. *En la kadro de la revuo ni partoprenis en la 10-a Irana Gazetar-Festivalo kiu okazis en majo kaj daŭris dek tagojn. La evento estis bona ŝanco al nia movado kaj feliĉe nia partopreno estis sufiĉe bona kaj efika. Ŝajnas ke ni estas ununura E-periodaĵo kiu partoprenis en tia festivalo (mi ne sukcesis trovi raporton pri similaj eventoj tra la mondo!). Dum 10 tagoj ni disdonis pli ol 16000 informilojn pri Esperanto kaj nian revuon al la vizitantoj. La reagoj estis esperigaj kaj pozitivaj.*

3. *S-ro Ahmad Reza Mamduhi -UEA ĉefdelegito en Irano dum jaroj 1984-5 - ekde la 3-numero estas nia redakciano kaj li plenenergie kunhelpas nin por plibonigi la revuon. Lia kunlaboro estas alia bona ŝanco al nia revuo por atingi pli bonan stilon kaj kvaliton.*

*La red.*

۳۹

2

**Nova proverbaro**

verkis: Morteza Mirbaqian

**Ŝ**ako malplena, estas peza kaj ĝena.

**D**e malica najbaro, forkuru al arbaro.

**Ŭ**ni honestecon honoras, sed honestulojn ignoras.

**D**ancu kvazaŭ neniu vidas vin, kantu kvazaŭ neniu aŭdas vin.

**K**ie muĝas sento, silentas prudento.

**P**or eviti grandajn fiaskojn, priatentu malgrandajn taskojn.

**Ŝ**ekreto kiun konas du homoj, estos konata en ĉiuj domoj.

**E**n ĉiu sezono, ekzistas bono.

**K**iam vi eliras por ĉasi vulpon,

estu preta por renkonti lupon.

**A**rbeton ne portu al la arbaro, nek botelon da akvo al la maro.

**M**urdas leono, pagas azeno.

**K**ion vi afable donas, al vi multoble revenas.

**Ĉ**io iras laŭ la natura leĝo, sen strebo ne helpas preĝo.

**Ŭ**ni evitu malamikon, eĉ etan kiel formikon.

**P**or ne plu vidi personon, al li pruntedonu monon.

**Ŭ**ni por personon koni, devas al li postenon doni.

**N**iaj pensoj nin trompas, kaj niaj sentoj nin rompas.\*

# Esperanto en mia Vivo

## (d-ino) Ŝirin Ahmad-Nia

Mi eklernis Esperanton, kiam mi estis nur 16-jaraĝa. Ĝuste kiam, mi ege sopiris lerni pri la mondo kaj ties diversaj kulturoj kaj homoj. Sendube Esperanto plej bone servis al mi tiurilate.

Pere de Esperanto mi konatiĝis kun multaj samideanoj el Japanio, Argentino, Pollando, Usono, Italio, Belgio, Svedio, kaj aliloke. Esperanto kun sia facileco kaj logiko ankaŭ donis al mi la memfidon instrui ĝin en la aĝo de 17! En la unua Esperanto-klaso gvidata de mi, partoprenis ankaŭ mia afabla instruistino pri la angla lingvo en la gimnazio, kiu scivolemiĝis pri Esperanto sekve de miaj entuziasmaj pri-paroloj.

Esperanto ankaŭ kuraĝigis min verki kiel poetino kaj verkistino. Mi verkis poemojn, kaj novelojn, kiuj aperis en la internacia Esperanto-gazetaro kiel Heroldo de Esperanto kaj Fonto. Miaj verkaĵoj kaj novaĵoj pri Irano ankaŭ aperis en EPC, Monato, Kontakto kaj Esperanto.

Mi sukcesis renkontiĝi kun la internacia rondo de esperantistoj dum la grandioza 71-a UK en Ĉinio (1986), kiu lasis al mi neforgeseblajn memoraĵojn. Krom belegaj momentoj de konatiĝo kun multaj interesaj homoj el la tuta mondo, mi havas kortuŝajn memoraĵojn precipe pri mia renkontiĝo kun



karmemoraj s-ino Ada Fighiera-Sikorska, kaj mag. Tibor Sekelj.

Dum tiu jaro mi elektiĝis la unua komitatano de TEJO el Irano, dum mi ankaŭ estis fakdelegito de UEA en Tehrano.

Mia edzo -Ahmad Reza Mamduhi- estis mem-lerninta Esperanton en sia junaĝo pere de angla-lingvaj lerniloj. Esperanto-movado konatigis nin al unu la alia. Baldaŭ ni komencis instrui Esperanton kune kaj agadi memstare, dum ni ambaŭ estis universitato-studentoj, li pri arkitekturo, kaj mi pri sociologio. Kiam nia filino naskiĝis, oni nomis ŝin la unua denaska esperantistino de Irano!

Mi daŭrigis la studadon kaj fariĝis doktorino pri sociologio el universitato en Anglio. Dum la jaroj de studado en tiu lando, mia familio kaj mi ĝuis la okazon kelkfoje renkontiĝi kun karaj samideanoj tie, kiel ekzemple d-ino Marjorie Boulton en Oksfordo, kaj fojon eĉ sukcesis viziti al UEA Centra Oficejo en Roterdamo. Tiuj renkontiĝoj revigligis la amon al Esperanto en ni kaj ni rekomencis verki de tempo al tempo en Esperanto.

Momente mi instruas en universitato en Tehrano, kaj esploras kiel sociologo pri temoj kiel virinoj, junuloj, sano kaj medicino en Irano. ★

Ŝirin Ahmad-Nia  
Majo.2003



شیرین احمدنیا  
خرداد ۱۳۸۲

## La amo mankas!

Primaveras,  
kaj mia koro,  
juniĝas refoje!  
sopirante renkontiĝon  
plenplenan je amo!  
sopirante  
atingi al  
“rigardo malseka pro l’ evento de  
l’ amo”!  
Kantado de l’ birdoj,  
brilado de l’ maten’,  
verdeco de l’ folioj,  
kaj freŝeco de l’ burĝon’,  
alkolektiĝas por  
donaci serenon kaj belecon  
alispecan al  
rendevuejo de l’ geamantoj!

Tamen,  
al kunvenejo de l’ natur’  
mankas la kunĉeesto de l’ amantoj!

La regno estas,  
regno de l’ silent’  
sena je l’ amoplana kunvokado,

En la bildo sendimensia,  
ĉeesto de l’ koroj  
mankas!

¡Citaĵo el la poemo “La Bona Soleca Nokto” far  
Sohrab Sepehri (1928-1980) el la libro “La Verda  
Volumeno” (1968)

## جای دل خالی است

بهار است و

قلب من جوان می شود دیگر بار

در آرزوی دیداری از عشق سرشار

در آرزوی

رسیدن به

«نگاهی که از حادثه عشق تر است»!

نغمه پرندگان و روشنی صبح،

سبزی برگ و تازگی غنچه

بهم می آمیزد

تا

مجلس عشاق را جلوه و صفایی دگر بخشد،

اما

مجلس طبیعت

از مجالست عاشقان خالی است!

عرصه، عرصه‌ی سکوت است و

از هم‌آوایی عاشقانه عاری است!

در این تصویر بی‌بعد،

جای دل خالی است!

انقل از شعر “شب تنهایی خوب” از سهراب سپهری (۱۳۵۹-۱۳۰۷):  
کتاب حجم سبز (۱۳۵۶)

# Bam-Citadelo

**La Plej Granda Adoba Konstruaĵo en la Mondo**  
*Registrita far Unesko kiel Universala Kultura Heredaĵo*

Tradukis : Asad Mahbub

Bamo estas malgranda urbo, ĉ. 1100 metrojn super la marnivelo, situanta sur la historie fama Silkvojo. Ĝi troviĝas en Kerman-provinco sud-oriente de Irano, sude de Kerman-urbo kaj norde de la Persa Golfo kaj la Omana Maro. Mildveteraj vintroj kaj tre varmaj someroj karakterizas la klimaton de tiu ĉi regiono, tiel ke la arboj ekburĝonas en la lastaj tagoj de februaro. Kiel plej multaj dezertaj lokoj, la noktoj eĉ dum la plej varmaj tagoj de la somero, estas malvarm(et)aj.




Pri la fondo-dato kaj - kialo de la citadelo ekzistas diversaj opinioj. Iuj kredas ke Bam-urbo fondiĝis dum la imperio de Partoj – tre potenca irana imperio – kaj estis tute florinta jam en la 10 jarcento. Ekonomie kaj komerce, Bamo okupis tre gravan lokon en la regiono kaj la plejmulto el ĝiaj tekstilaĵoj kaj vestaĵoj ĝuis

mondfamon. Ibne-Haŭgal (943-977), la vojaĝanta araba geografiisto en sia libro Surat-ol-arz (La Ter-figuro) skribis:

...Tie oni teksas bonegajn, belajn kaj daŭremajn ŝtofojn kotonajn kiuj elsendiĝas al foraj landoj kaj urboj; tie oni ankaŭ faras bonegajn vestaĵojn, ĉiu el kiuj kostas ĉirkaŭ 30 dinarojn; ili vendiĝas en Ĥorasano, Irako kaj Egiptio.

**La tuta konstuaĵaro fakte estas granda fortreso, en kies koro trovas sin la citadelo, sed pro la imponego de la citadelo, staranta sur la plej alta loko, oni nomas la tutan fortreson “Bam-citadelo”.**

Pri la deveno de la vorto Bamo, ekzistas ligoj eĉ al la miteca historio de Irano, nome laŭ-rakonte Bamo estas aliformiĝo de la vorto Bahmano, kio estas nomo de reĝo pri kiu Ferdoŭsi (940?-1020?), la plej renoma



Situo de Bamo en Kerman-provinco sude de Irano

La citadelo rigardata de la supro de enireja gvat-turo.  
La vojo laŭlonge de kiu ekzistas la bazaro



epopeisto irana, rakontas en sia plej fama verko Ŝahname (Libro de Reĝoj), verkita dum 30 jaroj (980-1010). Tiu ĉi epopeo, konsistanta el 60,000 rimohavaj poemlinioj, estas la plej antikva libro skribita en la moderna persa: kaj ĉiverke Firdoŭsi kaj kristaligis la persan lingvon (post kiam la araba estis disvastigita en Irano sekve de

**Tiu ĉi enorma citadelo, kiu situas sur la mondfama Silkvojo, konstuiĝis antaŭ almenaŭ 2500 jaroj kaj ĝis 1850 enhavis loĝantojn. Ne estas certe kial oni forlasis ĝin tiam.**

۳۵

6

alveno de Islamo), kaj disponigas pri la 1.5-jarmillonga historio de Irano de antaŭ Aĥemenidoj (la unua persa dinastio reĝa en 7a jc. a.K.), t.e. Piŝdadian-periodo, ĝis la islama alveno, t.e. jaro 641. Bahmano estis la filo de Esfandijar kiu estis batalinta kontraŭ Rostamo, unu el la ĉefherooj en Ŝahname. Kiel Fedoŭsi epopee rakontas, Bahmano batalas kontraŭ la filo de Rostamo, nomata Faramarzo. Sablo-ŝtormo malhelpas Faramarzon kaj Bahman venkis en la batalo kaj tial li festokaze konstruigis fortreson sur la ŝtona monteto tie, kie nun situas Bam-citadelo.

La areo de Bam-citadelo estas proksimume 180,000 kvadratmetroj, kaj ĝi estas ĉirkaŭita de muregoj 6-7 metrojn alta kaj 1815 metrojn longa! Ekzistas du gvat-turegoj ene de la plej interna limmurego nomataj "Veku-turegoj", dum entute ekzistas 67 diversaj turoj dise en la antikva regiono de Bamurbo.

La arkitekturo kaj planado de la citadelo estas tre genie elpensita divers-vidpunkte.

Ekz. de la nuna formo de ĝi, oni bone povas konstati ke ekde la unua paŝo en la desegnado, la planinto(j) estis antaŭvidinta(j) la tutan finan formiĝon de la konstruaĵo-urbo, kaj dum ĉiu fazo de konstruado, la jam konstruita parto ĝuis kompletecan figuron ĉu 2-dimensie ĉu 3-dimensie, kaj ĉiu parto tre bone povis "kunkudriĝi" al la aldonota parto de la posta konstrufazo.

La citadelo situas centre de la fortreso-urbo, sur la plej alta loko ebliganta la plej foran kaj vastan videblecon sekurec-cele. La okulfrapa impono de la citadelo, kaŭzis ke oni nomu ankaŭ ĉiujn aliajn konstruaĵojn ĉirkaŭe de ĝi, per "Bam-citadelo"!

En la arkitektura formo de Bam-citadelo distingeblas du apartaj partoj:

(1)La regantejo ene de la plej interna ĉirkaŭmurego, entenanta la citadelon, kazernon, muelejon, 4sezonan domon, akvoputon (digita en la ŝtona tero kaj ĉ. 40 metrojn funda!), kaj stalon por 200 ĉevaloj.



(2)La regatejo ĉirkaŭanta la regantejon, konsistas el: ĉefa enirejo de la tuta fortreso-urbo, bazaro laŭlonge de la spina akso sud-norda (konektante la enirejon al la citadelo), ĉirkaŭ 400 domoj kaj ties bezonataj publikaj konstruaĵoj kiel lernejo, sportejo, ..

Inter la domoj tri diversaj tipoj rekoneblas: plimalgrandaj domoj kun 2-3 ĉambroj por la malriĉaj familioj, 3-4-ĉambraj por la meza socia klaso, iuj el kiuj disponas ankaŭ pri verando, kaj fine pli luksaj domoj kun pli multaj ĉambroj diversdirektaj taŭgaj por la diversaj sezonoj de la jaro kune kun grandaj

kortoj kaj staloj apude. Tiaj ĉi domoj ne troviĝas en granda nombro en la fortreso. Ĉiuj konstruaĵoj estas faritaj el nebakitaj argilaj brikoj, t.e. adoboj. Verŝajne Bam-citadelo estas la plej granda adob-konstruaĵo en la mondo. Unesko registris ĝin kiel universalan kulture heredaĵon.

Kiam la pordego de la urbo fermiĝis, neniu homo aŭ besto povis eniri ĝin. En tia situacio, la enloĝantoj povis daŭrigi sian vivadon por longega tempodaŭro, ĉar ili jam disponis pri la akvoputo, plantitaj teroj kaj eĉ brutoj kaj dombestoj. Do en la kazo de sieĝigo de la fortreso-urbo, la loĝantoj povis enesti la urbon dum ties soldatoj povis konvene defendi ĝin tra la altaj muregoj kaj turoj.

Krom la gvat-turoj kaj ornamitaj mureg-pintoj, sur la ĉiel-linio de la fortreso, rimarkindas ankaŭ la vent-kaptliloj aŭ vento-turoj (perse: badgir). Ili estas eliĝintaj ĉielen el la diversaj konstruaĵoj por kapti la agrablan venton kaj konduki ĝin malsupren enen de la internaj spacoj de la domoj; iam

super-pasante la surfacon de akvobasenetoj en la domoj kaj por pli malvarimiĝi kaj por esti senpolvigita kaj por mildigi la sekecan aeron dezertan. Variformajaj vento-kaptiloj estas utiligitaj an diversaj lokoj. Ekz. ekzistas 4-direktaj vento-turoj por pli grandaj kaj pli gravaj konstruaĵoj, kiuj kapablas kapti divers-direktajn ventojn dum diversaj tagnokt-periodoj en ĉiuj sezonoj. Ekzistas ankaŭ 1-direktaj ventkaptiloj por malpligrandaj domoj.

Ekde la mezo de la 19a jc., la fortreso komencis forlasiĝi pro ne certaj kialoj. Nun ĝi estas unu el la plej allogaj turismaj lokoj en la regiono, kiun ĉiujare vizitas multegaj turistoj ĉu enlandaj ĉu eksterlandaj.

#### Fontoj:

- *Perslingva libro: Arge Bam (Bam-citadelo), far Davud Jusof-zade, Bamo: M. Mohammadi-zade, 1998, 160 p.*
- <http://www.caroun.com/Countries/Asia/Iran/Kerman/BamCitadel.html>
- [www.irancaravan.com/Nh03.htm#Bam](http://www.irancaravan.com/Nh03.htm#Bam)



Unu el la turoj de la dua murego

*Irana Poeto kaj Pentristo: Flua, Simpla kaj Profunda*

# Sohrab Sepehri:

*La Vento Mem, La Pluvo Mem  
... Sur Ĉiun Muron, Mi Plantos Dianton.*Tradukinto kaj kompilinto: **Ahmad Reza Mamduhi**

45-jara Sohrab

*Kaj ni ne timu de la morto  
Morto ne estas la fino de kolombo.  
Morto ne estas cikada invers'.  
Morto fluas en akacimens'.  
(el: La Piedir-sono de Akvo)*

Krom esti elokventa poeto, li ankaŭ kapable pentris. Li okazigis multnombrajn ekspoziciojn pri siaj pentraĵoj en Irano kaj eksterlande. "Li ne estis pentristo kiu nur hobia poemo. Li nek estis poeto kiu de tempo al tempo ekdeziru preni la penikon. Kaj liaj poemoj kaj liaj pentraĵoj estis serioze ĝuantaj la plej altajn karakterizaĵojn artajn."

De 1951, kiam li publikigis sian unuan poemlibron *La Morto de l' Koloro* ĝis 1967, sep poemaroj de li estis eldonitaj. Tiam por dek jaroj li pli ofte partoprenis en multaj pentraĵekspozicioj en Irano, Francio, Usono, kaj Svisio. Liaj poemoj kaj pentraĵoj estas tre intime interligitaj. Kaj en liaj pentraĵoj oni povas vidi la spurojn de liaj poemaj scenoj, kaj en la poemoj multokaze paroliĝas pri pentrado:

*Mi estas Kaŝanano.**Pentristo mi estas.**Mi faras kaĝon de tempo al tempo  
pere de koloro, kaj vendas al vi  
por ke per-kante de anemono kiu  
kaptitas ene de ĝi  
via soleca koro refreŝigu**Kia supozo, kia supozo, ... mi scias  
mia pentraĵo estas senviva.**Mi bone scias, la baseno de mia  
pentraĵo senas je fiŝo.**(el: La Piedir-sono de Akvo)*

## Sohrab


Sepehri (1928-1980), unu el la plej famaj poetoj kaj pentristoj de nuntempa Irano, estas homo kun optimista rigardo kaj pensmaniero. La profundaj pensoj kaj sintenoj malantaŭ liaj flue belaj poemoj, baziĝas sur lia funda kono pri la persa literaturo, irana mistikismo kaj budhismo.

En la spegulo de liaj poemoj, li ĉiam ŝajnas esti gajanima ĝuante altajn ekstazojn, ĉu kiam li parolas simple pri la lavado de telerio, ĉu kiam li priparolas morton:

*Vivo estas lavado de telerio.**Vivo estas la ektrovo de monereto en  
la stratkanaleteto.**(el: La Piedir-sono de Akvo)*



Plejparte liaj verkoj, ĉu poemaj ĉu pentraj, temas pri la naturo. Naturelementaj nomoj, en liaj poemoj, kaj la naturaj koloroj (precipe tiuj troveblaj en dezertoj, kie trovas sin Kaŝano, lia naskiĝurbo) en liaj pentraĵoj, tiel okulfrapas ke oni nomemus lin la artisto pri la naturo. Sed ankoraŭ liajn verkojn pli profundigas lia monddorigardo filozofieca.



24-jara Sohrab

En 1977 li publikigis sian novan poemaron, *Ni Nenio, Ni Rigardo* kune kun ĉiuj siaj antaŭaj sep poemaroj en unu saman volumon nomata *Ok Libroj*. La itinero, kion li trapasis dum sia artistita vivo, bonege montriĝas tra liaj verkoj. Samkiel okazas pri Mahmalbaf, la fama reĝisoro kaj verkisto de Irano (bv. rigardi n-ron 3 de tiu ĉi revuo, p. 3-5) ankaŭ Sepehri komencas per pli facilaj eldirmanieroj kaj finas per tre artistaj stiloj, kiuj iam ne estas facile kompreneblaj por la publiko. Rezulte, la plej popularaj verkoj liaj estas tiuj kreitaj en la mezpostoj de lia verkadoperiodo. Tio ĉefe estas lia longa poemo *La Piedir-sono de Akvo* kaj la poemlibro *La Verda Volumeno*.

*La Piedir-sono de Akvo*, povus nomiĝi pensmaniera biografieto de la poeto: ĝi kronologieske registras pensetapojn kiujn li traspertis dum sia relative mallonga vivo materia (52 jaroj).

En Irano, plej multaj homoj, emas citi verso(j)n de siaj ŝatataj poetoj dum la ĉiutagaj konversacioj. Eĉ la verkaĵoj de kleruloj en multaj okazoj miksatatas kun tiaj saĝornamoj. Sed tia citado plejparte okazas pri la versoj de poetoj kiuj verkis en la klasikaj kaj rimohavaj poemformoj – kaj la citaĵoj plejofte apartenas

al pasintjarcentaj poetoj, kiel Kajjam (ĉ. 1045-ĉ. 1122), Hafez (1320-1389), Sadi (1184-1281), Moŭlana (1207-1273, okcidente konata kiel Rumi) kaj ... Ekzistas tre malmultaj novaj poetoj, kies verkerojn la publiko citemus ĉi tiel. Sohrab jam estas unu el ili: tie kaj tie oni povas aŭdi/legi liajn versojn inter la paroloj/skribaĵoj de personoj de tute diversaj socitavoloj, precipe inter la pli juna generacio. Jene ni provas konatiĝi kun sohraba mondo tra liaj tiaj verkeroj, kiuj, kiel jamdirite, nun utiligatas ankaŭ kiel proverboj kaj parolornamoj:

Li amas la simplecon:

*Ni estu simplaj.*

*Ni estu simplaj; ĉu antaŭ bankiĉeto, ĉu sub la arbo!*

(el: *La Piedir-sono de Akvo*)

Li estas heroldo de amo kaj paco:

*Mi venos kaj sur ĉiun muron, mi plantos dianton.*

*Sub ĉiu fenestro, mi kantos poemon.*

*Ĉiun korvon, mi aldonacos pinon.*

(el: *Kaj Mesaĝo sur Vojo*)

Kvankam li estas tre sentema:

*Se vi venas mia-flanken,  
venu milde kaj trankvile, se ne, krevus  
la porcelano minca de soleco mia.*

(el: *Oazo en Momento*)

Tamen li estas realista:

*Mia patrino iumatene diris: Estas trista tempo.*

*Al ŝi mi diris: La vivo estas pomo, oni devas mordi ĝin kunŝele.*

(el: *Simplakolore*)

Ĝuste kiel multaj aliaj lialandaj poetoj, ĉu malnovaj (kiel Kajjam) ĉu novaj (Kiel Ĝalali, 1927-2000, bv. rigardi n-ron 2 de tiu ĉi revuo, p. 6-7), unu el la plej priparolataj temoj en liaj poemoj estas la morto:

*Iu persono mortis lastnokte*

*Kaj ankoraŭ tritikpano estas bongusta.*

*Kaj ankoraŭ, akvo verŝiĝas malsupren,  
ĉevaloj trinkas.*

*La gutoj en fluo,*

*la neĝo sur silentŝultro*

*Kaj la tempo sur l' spino de l' lilako.*

(el: *La Moviĝemo de l' Vorto Vivo*)

Tio, kio eble ne ŝajnus multo por multaj, por Sohrab signifis multe: liarigarde pomo, granato, kolombo, ... estas inter la plej valoraj aferoj – vivokialoj! Ĉiu nura el ili, kontentigus lin ekstazoivelen:

*La vivo ne malplenas:*

*ekzistas afablo, ekzistas pomo,*

*ekzistas kredo.*

*Jes*

*ĝis kiam anemono ekzistas, oni devas  
ĝui la vivon.*

(el: En Golestane)

*Ĵus kiam krevis granato*


*La mano ekiĝis dezirfontano!*

(el: La Piedir-sono de Akvo)

*Pro kio vi tristiĝis?*

*Korĝojgaĝoj ne malmultas: kiel  
ekzemploj, tiu ĉi suno,  
postmorgaŭa infano,  
venontsemajna kolombo.*

(el: La Moviĝemo de l' Vorto Vivo)



Pentraĵo far Sohrab Sepehri

Plej ĉiaman kaj plej gravan pozicion en liaj poemoj havas la naturo. En liaj verkoj oni renkontiĝas kun vasta spektro de naturaj elementoj, de tre etaj insektoj:

*Kaj ni ne deziru ke la muŝo forflugu de sur  
la fingropinto de l' naturo.*

(el: La piedir-sono de Akvo)

Tra belaj aŭ nebelaj plantoj kaj bestoj – “nebelaj” ja onies-rigarde kaj neniel Sohraba-takse:

*Mi ne scias*

*kial oni diras: ĉevalo noblas, kolombo belas.*

*Kaj kial en nenies kaĝo troviĝas vulturo.*

*Kion trifloro malpli havas ol ruĝa tulip’.*

(el: La Piedir-sono de Akvo)

Ĝis senvivaj naturaĵoj - kiuj cetere en la Sohraba mondo certe vivantas. Liaj poemoj plenplenas da riveroj, montoj, ĉielo, vento, pluvo, ... kiuj ĉiam okupemas la ĉefan lokon

en lia mondokoncepto. Sed, ilia ĉeesto en liaj pejzaĝoj ne limiĝas al iliaj nuraj eksteraĵaj sencoj; ĉiu el ili enportas mondon da signifo profunda en la far-li-kreitajn scenojn:

*Mi estas islamano.*

*Rozo estas mia gebleo.<sup>2</sup>*

*Fonto estas mia preĝuj’<sup>3</sup>, lumo estas mia  
mohro<sup>4</sup>.*

*Dezerto estas preĝtapiŝo mia.*

*Mi vozuas<sup>5</sup> per pulsado de l’ fenestroj.*

*En mia preĝo fluas la lun’, fluas spektr’.*

*Trans preĝo mia, la ŝtono videblas:*

*Jam kristaliĝis ĉiuj eretoj de mia preĝo.*

*Mi mian preĝon komencas tiam*

*kiam azanon<sup>6</sup> ĝian, la vento estu dirinta el  
la minaretsupro de la cipreso<sup>7</sup>.*

(el: la Piedir-sono de Akvo)

Multaj el liaj poemoj estas beleprimoj de zenaj konceptoj:

*Mi, kiu parolis kun la popolo de tiu  
ĉi regiono tra l’ plej ovrataj fenestroj  
Ne aŭdis parolon el tempomaterialo.  
Neniu okulo ameme gapis al la tero.  
Neniu delektiĝis vidante ĝardeneton.  
Neniu taksis serioze korveton ĉe l’  
farmosoĵlo.*

(el: La Voko de l’ Komenc’)

*Oni devas lavi l’ okulojn, oni devas  
aliel vidi.*

*Oni devas lavi la vortojn.*

*Vorto estu la vento mem, vorto estu  
la pluvo mem.*

(el: La Piedir-sono de Akvo)

Kaj fine ... sur lia tomoŝtono engravuriĝis jena poemo lia:

*Se vi venas mia-flanken,*

*Mi estas malantaŭ neni-ujo.*

*Malantaŭ la neniujo ekzistas loko*

*Malantaŭ la neniujo, vejnoj de l’  
aero plenas de kurieroj,*

*kiuj alportas novaĵon pri la  
ekburĝoninta floro de plej fora ter-  
arbedo.*

...

*Se vi venas mia-flanken,*

*venu milde kaj trankvile, se ne,  
krevus*

*la porcelano minca de soleco mia.*

(el: Oazo en Momento)

### Kronologie pri Sohrab Sepehri

1928 Naskiĝis en Kaŝano

1951 Eldoniĝo de lia unua poemlibro La Morto de Koloro

1953 Licenciigis pri pentrado en la fakultato pri belartoj en Tehran-Universitato  
 1953 Partoprenis en kelkaj pentrafekspozicioj en Tehrano  
 1957 Enskibiĝis en la Pariza Lernejo pri Belartoj en litografia fako  
 1958 Partoprenis en la Unua ĉiudujaja Pentrafestivalo de Tehrano  
 1960 Partoprenis en la Dua ĉiudujaja Pentrafestivalo de Tehrano kaj gajnis la unuan premion por belartoj  
 1960 Lernadis de ksilografio en Japanio  
 1961 Vizitis al Hindio  
 1961 Komencis instrui en la Artejo pri Belaj Artoj  
 1963 Partoprenis en la bienalo de pentraĵoj en Saŭ-Paŭlo, Brazilo  
 1964 Vizitis al Hindio, Pakistano kaj Afganio  
 1965 Eldoniĝo de La Piedir-sono de Akvo  
 1965-66 Vizitis al Eŭropaj landoj  
 1966 Eldoniĝo de lia longa poemo La Vojaĝanto  
 1967 Eldoniĝo de poemlibro La Verda Volumeno  
 1967-77 Partoprenis en pli ol deko de pentrafekspozicioj en Irano, Francio, Usono, kaj Svisio  
 1977 Eldoniĝo de Ok Libroj (entenanta ĉiujn antaŭajn sep poemarojn plus la nova Ni Nenio, Ni Rigardo)  
 1979 Reeldoniĝo de Ok Libroj  
 1979 Vojaĝis al Britio por kuraciĝo  
 1980 Revenis al Irano, kaj forpasis post preskaŭ unu monato

### Notoj:

1. Aŝuri, Darjuŝ k.a., Pajami dar Rah (Mesaĝo sur Vojo), Tehrano: Tahuri, 1981, 136 p., citaĵo estas el ĉapitro far Karim IMAMI: De Anemona Kanto ĝis Plisuproj, p. 33-59.

2. *Gebleo*\* laŭvorte signifas “direkto”n en la araba, kaj implicas “direkton al Kaabo”. Islamanoj, kie ajn, preĝas en tiu ĉi direkto (t.e. direkte al Mekko en Saud-Arabio). *Gebleo* ankaŭ signifas Kaabon, kiel en tiu ĉi verso.

3. *Preĝujo* estas bele kudrita ŝtofajo sur kiu oni metas mohron (kaj rozarion) dum la preĝado, kaj uziĝas ankaŭ kiel konservujo por ili post la preĝo.

4. *Mohro*\* estas argilaĵeto sur kio la preĝanto metas la frunton dum la Saĝdeo\* (terenkuŝiĝo).

5. *Vozuo*\* estas la rita lavado antaŭ la preĝado en Islamo.

6. *Azano*\* arabdevana vorto signifas “anonci” laŭvorte, kaj en Islamo estas nomo de teksto kion muezino aŭ *azanulo*\* laŭte legas alvokante la islamanojn al preĝado en la difinitaj horoj.

7. *Cipreso* en la persa literaturo estas simbolo de alteco (ĉi tie similigata al minareto) kaj libereco (En okcidenta kulturo, laŭ PIV, ĝi simbolas funebtron).

### Fontoj (ĉiuj perslingvaj):

SEPEHRI, Sohrab. Haŝt Ketab (Ok Libroj), Tehrano: Tahuri, 1977.

AŜURI, Darjuŝ k.a. Pajami dar Rah (Mesaĝo sur Vojo), Tehrano: Tahuri, 1981, 136 p.

www.sohrabsepehri.com (Tiu ĉi fonto enhavas la kompletan poemaron de Sepehri, kaj ankaŭ disponigas utilan serĉilon por ili.)

**Fotoj kaj pentraĵoj:** www.sohrabsepehri.com



Pentraĵo far Sohrab Sepehri

# La nigrigita mevo



Antaŭ kelkaj jaroj, Irako okupis Kuvajton kaj poste Usono kaj kelkaj aliaj Ŝtatoj atakis Irakon. Dum la milito, la petrolo malpurigis akvon. En la televidaj kanaloj oni montris birdojn malpurigitajn je petrolo. Tiu sceno impresis min verki jenan poeziaĵon. Nuntempe kiam Usono refoje atakis Irakon malgraŭ tutmondaj kontraŭstaroj, Ŝajne estas bona okazo prezenti ĝin.

**d-ro Kejhan Sajjadpur (Keyhan Sayadpour)**

- |   |   |
|---|---|
| <p>- Mi estas:<br/>Nigrigita mevo,<br/>Viktimo de l' fi-revo,<br/>Kaj de l' region-krevo,<br/>Ĉu defenda devo?</p> <p>- Mi estis:<br/>Birdo neĝkolora,<br/>Sur marbordo ora,<br/>Pacemulo elkora,<br/>De l' politiko fora.</p> <p>- Min nigrigis:<br/>Petrol-tuba rompo,<br/>Malica trompo,<br/>La fumo de l' pompo,<br/>La minaco de l' maskeradbombo.</p> <p>- Mi vidis:<br/>Okupantaran feston,<br/>Fremdarmean ĉeeston,<br/>Armilan provteston,<br/>La Dezertan Tempeston (1).</p> <p>- Mi atentigas ke:<br/>La teron skui,<br/>Ĉion detruui,<br/>Morton ĝui,<br/>Kiel rekonstrui?</p> <p>- Mi aŭdis:<br/>Ŝprucantan petrolputon,<br/>Ies diskuton,<br/>Alies malmuton,<br/>La vanav tuton.</p> <p>- Min mirigas:<br/>La petrol-milito,<br/>Orgojla kreito,</p> | <p>Eksplodo de dinamito,<br/>Kies profito?</p> <p>- Mi rakontas pri la:<br/>Ligo inter ŝtatoj,<br/>Plene armitaj soldatoj,<br/>Bombo-riĉaj Vir-katoj (2),<br/>Malfeliĉaj atakatoj.</p> <p>-Min maltrankviligas:<br/>Misilo-donaco,<br/>Pro misilminaco,<br/>Ĉiama malpaco,<br/>Ĉu ekzistas kuraco?</p> <p>- Min impresis:<br/>Konsciencia malforto,<br/>Fortula komforto,<br/>Malfortula morto,<br/>Kiom mizera sorto!</p> <p>- Min suferigas:<br/>Neniigo de ĉio,<br/>Kaj de l' petrol-industrio,<br/>Mort-ceremonio,<br/>Ĉu nova Vjetnamio?</p> <p>- Mi pensas pri:<br/>La homaj rajtoj,<br/>Kies rajtoj?<br/>Sub bombardantaj kajtoj (3),<br/>Ĉu estos futuraj Kuvajtoj?</p> |
|---|---|

1-La Dezerta Tempesto estis la nomo de la militoperacio far Usono

2-Usona milita flugilo (Tomcat).

# Japana karavano en Irano

Raporto de TAKAOKA Michiko pri Vojaĝo de Japanaj Esperantistoj al Irano

Mi kaj sep membroj el nia esperanta grupo. Verda Merkredo, kune vojaĝis al Irano de la 20a ĝis 27a de marto 1999 gvidate de nia irana amiko s-ro Reza Ĥejrĥah.

La plano de la vojaĝo jam delonge devenis de nia konatiĝo kun Reza, ekde kiam nia grupo invitis lin unufojon po monato kiel gvidanton de nia esperanta konversacia lernado.

**Se mi havus alian ŝancon viziti Iranon, mi denove vizitos la mirindegan moskeon en Esfahano.**

Li ofte parolis pri Irano, kaj fojfoje diris ke li volas preni nin al Tehrano kaj gvidi en diversajn lokojn. Ni duonŝerce diris, "Bonvolu fari la vojaĝplanon, do ni sekvos vin." Dume, amikeco kun fido kreskis inter ni, kaj la vojaĝo al Irano kune kun Reza fariĝis nia komuna revo. Do finfine la tempo venis por nia revo realiĝi. La karavano konsistis el 15 membroj inkluzive de Reza. Krom Teheranon, ni vizitis Ŝirazon kaj



Esfahanon, tio estis turisma parto de nia vojaĝo.

"Persepolo" estis grandega loko, kiu situas ĉirkaŭ 50km norde de Ŝirazo, kaj nun ĉirkaŭata de dezerta loko iom trista malgraŭ tio ke dum tago ĝi pleniĝas de turistoj. Marŝante en la vasta loko kaj vidante restaĵojn de ruinigitaj kolonoj, mi ekpensis pri longa fluo de la tempo kaj antikva prospero de Akemena dinastio. Irano posedas enormajn tavolojn de historio kaj kulturo. Tamen mi opinias ke relative al la ĉirkaŭanta vetero kaj naturo, la konservado de "la monda heredaĵo" havas grandajn problemojn.

Mi volas rimarkigi du allogajn punktojn de la urbo. Unu estas la rivero Zajande kaj la pontoj super ĝi. Bela larĝa rivero kun abunda akvo fluas trapasante la urbon. Kaj ĝi sur havas multajn famajn pontojn, kiuj havas du-etaĝan strukturon. Suba etaĝo

**Nur unu semajna vojaĝo en Irano donis al mi tre amikan senton al la lando**

estas nur por ke homoj povu ĝui promenadon. Tie troviĝas te-trinkejo nomata ĉai-ĥane kaj malgrandaj vendejoj. Ni vizitis unu el la plej famaj te-trinkejoj kaj admiris ĝin por ke tio estas bone planita en la centro de la rivero ebligante ĝui belecon de riverfluo kaj pejzaĝo. Supra etaĝo estas por trafiko de veturiloj kaj ankaŭ piedirantoj. Transpasante ponton malrapide, multaj familioj ĝuas promenadon. Laŭ la river-bordo kuŝas granda parko, ankaŭ kie multaj homoj ripozas. Tio estis tre paca bildo. Nokte la pontoj tre belege lumigitaj

allogas turistojn.

Antaŭ la vojaĝo ni vizitis oficejon de Iran Air. Kaj tie bela broŝureto de Iran Air estis

### Irano posedas enormajn tavolojn de historio kaj kulturo.

disdonata al ni, kiu multe incitis nian deziron al Iran-vojaĝo. Tre bela internaĵo de iu moskeo aperis sur la kovrilo de la broŝureto. Sed kiam mi vidis la saman moskeon, *Masĝede Ŝejĥ-lotf-ol-lah*, frapis min la realo. Min sciigis la realo ke la realo de ĝi multe, multe superas ol fotoj aŭ imago.

Beleco de interna moskeo estas tute super esprimovo. Mi fotis, kaj aĉetis belajn fotojn de ĝi. Sed eĉ la plej bela foto nur kaptas la parton, ne povas montri la tutan figuron. Starante sub la ronda tegmento en milda lumo enradianta tra la multaj malgrandaj fenestroj, ĉirkaŭate de blua koloro de mozaikaj kaheloj, profunda emocio kune kun stranga sento de nostalgio plene regis mian koron. La tuta etoso de moskeo donas al ĉiuj homoj elkoran trankvilecon. Emam Placo sufiĉe montras la plej gloran paĝon de Islama historio, kaj ni povas diri la simbolo de riĉa prospero kaj forteco.

Se mi havus alian ŝancon viziti Iranon, mi denove vizitos la mirindegan moskeon en Esfahano.

Nur unu semajna vojaĝo en Irano donis al mi tre amikan senton al la lando, kaj profunde mi impresiĝis pro ĝia heredaĵo de longa historio. Reveninte hejmen mi ripete rememoras la internan bluan belecon de *Masĝede Ŝejĥ-lotf-ol-lah*, aŭ dezertan pejzaĝon, aŭ ĉarmajn okulojn de infanoj. ★



۲۷

14

Fotoj:

Komplezo de Reza Ĥejrĥah

